

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 14, Januaro 2019



*Al la tuta mondo:*

***Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!***

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

***[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)***

## Enhavo

Enhavo.....	2	Poemo pri talento, originale verkita en esperanto de Lilli Giloteaux .....	16
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Filoj de la epoko (Wisława Szymborska).....	17
EspePorko meditas.....	3	Anekdotoj (el 1904) .....	17
Memore al Ebbe Vilborg .....	4	Esperanto-Sabato en Gotenburgo, 19 jan. 2019 .....	18
La urbestro de Gdansko, Pawel Adamowicz, estis murdita la 15an de januaro .....	5	Problemoj fariĝi poligloto – Erik Åberg sendis internet-ligilon .....	19
Esperanto-libroj al la biblioteko de Stannum	6	Marvirinstrato – libro kun 18 noveloj, verkitaj en Esperanto .....	20
Propono por 2019 .....	6	Granda paruo – Parus major.....	20
Kapablo esti bona.....	7	La granda paruo kaj la vento .....	21
Pri Stefan Einhorn .....	7	Esperanto på två bibliotek, Inga Johansson ger oss dagsläget i Göteborg .....	21
Liseberg, la sonĝoj pri eldorado .....	8	Esperantoutställning på Humanistiska biblioteket, Göteborg .....	23
Memoru la gotenburĝanon Sonya Hedenbratt!.....	9	Volapük kaj Esperanto .....	23
Nova esperanta versio de "La koboldo" de Viktor Rydberg .....	10	Liseberg kaj la fratinoj Nonnen.....	24
La legendo pri la kristnaska rozo de Selma Lagerlöf.....	11	Genealogia tabelo de John Nonnen kaj lia familio .....	26
La Baltaj tagoj en Litovio, 6–14 de julio .....	14	Cipro, dividita insulo – Cypern, en delad ö..	27
Pola Kristnaska saluto de Elvira al ĉiuj, kiujn ŝi konas.....	15	Vojaĝo al Cipro de Siv Burell kaj Ingrid Vallin .....	27
Feliĉan Novan Jaron de Pollando!.....	15		
Mirinda Etoso de Pollando.....	16		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. La eldonfrekvenco estas neregula.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com). Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



## EspePorko meditas

### Novan Felîcan Jaron 2019!



- \* Bedaŭrinde Gotenburgo perdis du esperantistojn dum 2018 – Ebbe Vilborg kaj Ulla-Britt Anneling. Gdansko perdis sian urbestron.
- \* Bonege por porkoj, katoj, hundoj, ĉevaloj – kaj homoj – ke la reguloj pri pyrotekniko pli kaj pli rigoriĝas.
- \* La granda paruo estas la birdo de januaro. Manĝigu ĝin!
- \* Vintro en Liseberg estas populara en decembro. Kiam neĝo ne troviĝas en Gotenburgo, ni ĝuu artefaritan neĝon en Liseberg!
- \* Ingrid kaj Siv konstatas ke la temperaturo en Cipro estas inter 17 kaj 24 gradoj en decembro. Sur la bildo ni atendas la transiron de la "verda limo" de la turka al la greka parto de Cipro. Oni nepre kunportu sian pasporton! Mense la interna milito, kiu finiĝis en 1974, ankoraŭ daŭras.
- \* La Kristnasko iomete restas en niaj pensoj. En ĉi tiu numero estas:  
Kristnaskaj anĝeloj de Elvira, Pollando. Nova versio de Tomten (la koboldo) de Tatu Lehtilä. Mi admiras liajn ritmon kaj rimojn. Ankaŭ la legendo pri la

kristnaskaj rozoj de Selma Lagerlöf havas lokon en nia ĵurnalo. Fakte ne multaj el miaj konatuloj konas la legendon.

- \* Meditu pri la Novjara propono por 2019 – estu afablaj, pensu nur bone pri viaj kunvivantoj! Kaj – legu la libron de Stefan Eihorn!
- \* Novjardeziroj venis de Lucyna, Pollando – ni dankas kaj reciprokas!
- \* Se vi bezonas argumentojn por igi iun lerni esperanton, guglu sur "My Language Past & Why I'm Learning Esperanto." Erik Åberg proponis tion.
- \* Se Ingegerd ne trovas legendon pri birdo, ŝi mem inventas novan. Bonege!
- \* Se vi kredas aŭ ne – la somero alproksimiĝas kaj la someran kurson ni jam planas. Ĝi okazos 24–28 junio en Gotenburgo.
- \* Ĝis nun kvar gotenburganoj aliĝis al UK en Lahtio 20–27 julio. Estas loko por pliaj. Krome: La Baltaj tagoj 4–14 de julio!
- \* En la universitata biblioteko de

Gotenburgo troviĝas ekspozicio pri la unuaj esperantaj libroj. Joakim Lilljegen faris ĝin kaj ĝi restas dum januaro kaj dum almenaŭ la unua semajno de februaro.

\* Januaro estas monato kun multaj fakturoj. Ne forgesu la esperantajn kotizojn, kiuj estas pagendaj. La konto de la gotenburga klubo, de kiu nia kasisto ankaŭ plusendas pagon al SEF, Sveda Esperanta Federacio, estas

43612–1. Membreco kaj de SEF kaj de la gotenburga klubo kostas 235 SEK.





*Ebbe multfoje prelegis, ekz. pri nov-eldonitaj esperantolibroj.*

## Memore al Ebbe Vilborg



*Je la reinaŭguro de Esperantoplatsen en 2008. De maldekstre: Ebbe Vilborg, Siv Burell, Inga Johansson, Britta Rehm kaj Anita Dagmarsdotter.*

### Diinspirita esperantisto forpasis

Ebbe Vilborg, Gotenburgo, forpasis la 30an de decembro, 92-jara.

Ebbe multege gravis por la esperantomovado.

Kiel ni aranĝus la aferon sen liaj vortaroj.

Certe ni sentus nin pli malriĉaj sen liaj etimologioj, kie la esperantaj vortoj montriĝis havi radikojn de la latina, greka kaj ankaŭ de modernaj lingvoj.

Certe la esperantobiblioteko en Stannum ricevis oran randon, post ke ni de la filo Niclas Vilborg, transprenis esperanto-librojn de Ebbe kaj ankaŭ librojn en aliaj planitaj lingvoj, kiel Volapük, Ido, Mondial kaj Interlingue.

Precipe ni memoras lin kiel preleganton en decembro multajn jaron envice, kiam li rakontis pri esperantaj libroj, eldonitaj dum la jaro.

Li ricevis internaciajn laŭdon kaj estis honora membro de UEA, Universala Esperanto-Asocio. En 2006 li ricevis premion de la Sveda Akademio pro sia Esperanto-vortaro. /Siv

### En gudabenådad esperantist har gått ur tiden

Ebbe Vilborg, Göteborg avled den 30 december 2018 vid 92 års ålder.

Ebbe har betytt oerhört mycket för esperantorörelsen.

Hur skulle vi ha klarat oss utan hans ordböcker? Visst hade vi känt oss fattigare utan hans etymologier, där esperantoorden visade sig ha rötter från latin, grekiska och även moderna språk.

Visst har esperantobiblioteket i Stannum fått en guldkant, sedan vi av sonen Niclas Vilborg fått överta Ebbes esperantoböcker och även böcker på andra planerade språk, som Volapük, Ido, Mondial och Interlingua.

Framför allt minns vi honom som föreläsare i december många år i rad, då han berättade om esperantoböcker, som hade givits ut under året.

Han fick internationellt beröm och var hedersmedlem i UEA, Esperantorörelsens Världsförbund. År 2006 belönades han med ett pris från Svenska Akademien för sin Esperanto-ordbok. /Siv

**Ebbe Vilborg** mortis la 30 de decembro 2018. Li havis 92 jarojn. Li naskiĝis en 1926. Li lernis esperanton kiel 14-jara knabo. Lia patro ekhavis lernolibron sed ne havis tempon por lerni la lingvon. Li donis ĝin al sia filo Ebbe kiu baldaŭ rimarkis ke esperanto helpis lin plibonigi sian studadon en la germana lingvo. Post klasikaj studoj pri la latina kaj greka lingvoj li fariĝis docento en la greka. Dum multaj jaroj li estis instruisto en gimnazioj kaj en la universitato.

En 1958 li eldonis Lilla Esperanto ordboken, La malgranda Esperantovortaro. Kaj post multjara laboro li povis en 1992 eldoni Ordbok Svenska–Esperanto, vortaro Sveda–Esperanta. Ĝi estas vera orminejo por svedaj esperantistoj.

En 1973 La sveda Esperanto Instituto ekhavis novan sidejon en Gotenburgo kaj Ebbe fariĝis ĝia rektoro kaj havis tiun postenon ĝis 1993. Dum la jaroj 1989–2000 estis eldonita lia Etimologia Vortaro en kvin libroj. Pro tiu verko li ricevis la Osiek premion en 1992.

Li ankaŭ skribis plurajn librojn pri la latina kaj greka lingvoj kiel Sveda–Latina vortaro kaj Latinaj citaĵoj.

Dum longa tempo li estis membro en la Esperanto Akademio kaj en UEA. Ĉiun jaron li estis estimata preleganto pri nova esperanto literaturo en la Esperanto-Societo de Gotenburgo.

## **La urbestro de Gdansko, Pawel Adamowicz, estis murdita la 15an de januaro**



Kiam ni – naŭ personoj el la Esperanto-Societo de Gotenburgo – vizitis Gdansk–Sopot–Gdynia, Margareta Andersson faris ĉi tiun foton.

Pawel Adamowicz ludis grandan rolon kiel urbestro en unu el la plej grandaj urboj en Pollando. Li engaĝiĝis por demokratio, rifuĝintoj kaj lasttempe ankaŭ por HBTQ-raĵtoj. Jam dum la soveta diktaturo li, kiel membro de la sindikato Solidareco, laboris por liberigi Pollandon de la Sovet-Unio.

La murdinto suferis de psikaj problemoj kaj havis kriman fonon. De la scenejo li kriis ke li estis senkulpe kondamnita, kiam la partio de Pawel Adamowicz regis. Dum la bonfarada festo kun multe da spektantoj, li atakis la urbestron per hakilo kaj trafis lin en la koro kaj brusto.

Niaj polaj geamikoj tuj raportis tiun malĝojan agon al ni. Fakte ni en septembro parolis kun alia urbestro komence de la parado en Sopot. Ĉiuj urboj havas propran urbestron. Ŝajnas ke la urbestroj ĝis nun ne bezonis sekurigajn disponojn.

# Esperanto-libroj al la biblioteko de Stannum

Ulla-Britt Anneling apartenis al la Esperanto-Societo de Gotenburgo dum multaj jaroj.

Foje ni estis invititaj al ŝia somerdometo, Fagerdal. Estis varmega tago. Ŝi havis multe da belaj floroj sur la altano. Estas paradizo por ni kaj ŝi – sed bedaŭrinde ankaŭ por vespoj. Ni devis forlasi la altanon.

Malgraŭ ke ŝi havis problemojn moviĝi (ŝi trapasis kelkajn



operaciojn) ŝi ŝatis esti en la somerdometo kune kun sia kato.

Tamen ni pli kaj pli malofte vidis ŝin en niaj kunvenoj.

En decembro, ŝia filino Anette Banås venis al Gråbo kun sako de esperantaj libroj. Ŝi sciigis al mi ke Ulla-Britt forpasis jam en septembro kaj nun Anette volas ke ni enmetu la librojn de ŝia patrino en la bibliotekon de Stannum. Dankon! Baldaŭ ni registros ilin.

## El la libraro mi elektas "Tutmonda Sonoro" de 1981



Ĝi komenciĝas per esperanto-traduko de asiriaj, babilonaj tekstoj, sekvas praegiptaj tekstoj, hebreaj tekstoj, malnovgreka kaj romia literaturo, ĉina kaj japana

literaturo, araba kaj persa literaturo kaj fine "moderna literaturo".

Sur paĝo 288 mi trovas japanajn hajkojn de Baŝoo:

Jen – krio mola!  
Ĉu estas voĉ' de l' Luno?  
Ne! Voĉ' kukola.

Taban' ludetas  
sur floro. Ĝin ne manĝu,  
paser' mi petas.



Lag' forlasita  
kaj muta. Plaŭd', ensaltis  
rano subita.


## Propono por 2019

Ĉu vi intencas doni novjarajn promesojn?

Mi havas proponon!

Donu al ĉiuj el via afableco, estas la plej bona donaca pakaĵo kiun vi povas doni!

Unue: Uzu afablajn vortojn en viaj dialogoj kun fremdaj kaj konataj homoj.



Due: Kiam vi skribas al iu, mejlojn, leterojn, fejsbukaĵojn ktp... uzu nur afablajn vortojn.

Trie: Vidu nur la plejbonon ĉe viaj proksimuloj.

Fine: Interpretu ĉion por la plej bona! Tiam, ni povas bonvenigi pli bonan mondon kaj tio estas la tasko por la Esperanta movado.

*Plejfine,*

*Afablaj vortoj povas fari miraklojn,  
– la vortoj sanigu la vundojn de la koro.  
Estas konsolo en malhelaj horoj,  
unu mano, kiu sekigas la larmojn de okuloj.*

La plej bona ideo dum la tuta jaro!

*Ingegerd*

## Kapablo esti bona

**Legu la libron:**

**"Kapablo esti bona"** de la verkisto Stefan Einhorn.

Tiel oni priskribas la libron:

*La koncepto "bona" signifas ofte stulta, nematura kaj moleca.*

*En sia libro "Kapablo esti bona" montras la verkisto alian signifon de la vorto.*

*"Por mi, bona homo estas persono kiu vivas kun la etiko en sia koro.*


*Bona homo portas ene la konscion pri la proksimuloj."*

Stefan Einhorn volas diri ke ni estas niaj interrilatoj kaj boneco estas io de plej bona kiun ni povas fari.

*/Ingegerd*



Foto de Thron Ullberg



### Pri Stefan Einhorn

Stefan Einhorn naskiĝis la 26-an de oktobro, 1955. Li estas sveda kuracisto, profesoro kaj verkisto. Li estas la filo de Jerzy kaj Nina Einhorn kaj frato de Lena Einhorn.

La libro "Kapablo esti bona" estis dum 2005 la elekto de librovendistoj.

Stefan Einhorn iras en la piedsignoj de patro Jerzy, kiu faris multon por la venko la terura malsano – kancero.

Stefan Einhorn eldonis "Malgranda libro pri kancero" en 1992.

Legu en lia ĉefpaĝo pri aliaj libroj kaj pensu bonajn pensojn pri Stefan Einhorn. /Ingegerd

## Liseberg, la sonĝoj pri eldorado

La amuzejo Liseberg en Gotenburgo estis inaŭgurita la 8an de majo, dum la mirinda Gotenburga ekspozicio en 1923. Post tiam grandaj kaj malgrandaj okazintaĵoj faris egajn impresojn al ĉiuj kiuj vizitis la amuzejon inter bonŝancaj radoj kaj teruraj atrakcioj. Multe da sentoj kreskis onde kaj jen malgranda resumo:

Ni komencas pri la "malhonoro" kiu okazis dum la Gotenburga ekspozicio en 1923. Unu el la atrakcioj estis la "Liliputlando" kie malaltkreskaj homoj estis ekspozitaj al la publiko. Pri tio arogaĵo la hodiaŭa estraro ne ŝatas. Ili hontas. Tion mi aŭdis per miaj propraj oreloj.

Akcidentoj ĉiaspecaj okazis, ekzemple kiam unu el la trajnoj de Liseberga fervojo venis kelkan distancon je la unua kontraŭdeklivo



La "Valkyria" en la fono.



Kal kaj Ada ĝojas en Liseberg.

kaj unu ĉeno rompiĝis kaj la tuta kaleŝo disfalis malsupren. Tio okazis la 1an de julio, 2006.

Se oni volas senti kapturon kaj stomaketurnajn sentojn mi rekomendas la montan fervojon Balder kaj tie troviĝas multe da homklakiloj je la amuzejo Liseberg. Se vi deziras pli trankvilan kapturan aventuron, mi rekomendas la Parizan radon. Sed se vi havas pli da kuraĝon vi povus provi "Valkyria" kaj "Loke". Mi

garantias ke la lasta manĝaĵo, kiun vi manĝis reiros en la terura vagono.

La plej malseka travivaĵo estas la torenta flosado "Kållerado". Ni iras per la flava kaj ronda pneŭmata boato. Tie ĉi oni surŝpruciĝos kun akvo kaj foje oni alvenos sub neatendita duŝo. Mi vere rekomendas vestŝangojn.

Se vi volas travivi ion tre timigitan, oni povas viziti la fantomhotelon "Gasten". Tio ĉi estas nenio por geuloj, kiuj havas malfortajn nervojn kaj timojn. Tie ĉi vi renkontos homojn kiuj havas enfalintajn okulojn, palajn vizaĝojn, unukrurajn ĉifonulojn kiuj travivis severan vivon kaj nun volas revenĝi.

Ne provu vian bonŝancon ĉe la bonŝancaj radoj ĝis antaŭ vi hejmeniros. Multaj vizitantoj devas pasigi horojn akompani



rozkoloran urson en giganta formato aŭ kvadratmetran keksĉokoladon. En tia situacio mi demandas min ĉu estas gajno aŭ perdo!

Malsato estas io, kio trafas ĉiujn vizitantojn kaj en la amuzejo troviĝas multe da restoracioj je malsimilaj prezsituo. Vizito al "Världshuset", "Hamnkrogen", "Huvudrestaurangen" aŭ "Järnvägsrestaurangen" estas por la dikaj monuoj, sed troviĝas ankaŭ aliaj ejoj ekzemple malmultekostaj kafejoj, hakviandaĵejoj kaj tiel plu. Ĉiuj laŭ opinio kaj gusto.

Bonan kondiĉon vi kunportas sur "Polketten" kiu havas bonan plankon por danci. "Gammeldans" kaj fokstroto kaj multaj aliaj ekzercoj kaj progresadoj turniĝis ĉi tie. Sendube multe da paroj sin rendevuis kaj la amo trafis ĉi tie.

Kelkaj memoras la muzikon de Ronnie Hartley kaj lia orkestro kiuj ludis varmajn kaj

sentimentalajn tonojn. Sten-Åke Cederhök, Evert Taube, Håkan Hellström kaj aliaj grandaj artistoj donis signojn en la memoro.

Fine, vizito al Liseberg povas esti kaj streĉa kaj fantazie mirinda.



*En la komenco de la 1960-aj jaroj. Ingegerd sidas dekstre kun harrozeto.*

Ingegerd

## Memoru la gotenburĝanon Sonya Hedenbratt!

Sonya Hedenbratt naskiĝis la 4an de marto en 1931 en la strato "Fjällgatan", Masthugget en Gotenburgo.

Jam 17 jara ŝi komencis la vojon kiel kantistino en la "Kungshall" kun sia frato Östen Hedenbratt kiu estis muzikisto tie. En la jaro 1951 Sonya gajnis la titolon "la Gotenburĝa Doris Day". Mi volas aserti ke Sonya Hedenbratt estas unu el la plej bonaj ĵazzkantistinoj kiun Svedio iam havis. Kun sia granda muziktalento ŝi



transdonis ĝojon inter muzika ĝenro kaj inter homoj.

Ŝi estis vaste amata de la publiko pro televido, "Jubel i Busken" kaj "Låt hjärtat va me" sed antaŭ ĉio ŝi estis grandioza jazzkantistino.

En mia juneco mi foje renkontis Sonya sur "Danska Vägen" Mi estis survoje al mia laboro en Lunden. Sonya iris celkonscie

kun nefermitan mantelo kaj mansaketo en la mano kaj subite ŝi flankeniris je unu pordo.

Mi pensis ke estis bone renkonti la faman ĵazkantistinon en la komenco de la labortago. Foje mi vidis ŝin sur la granda scenejo en Liseberg. Mi neniam forgesu! Estas granda travivaĵo mi portas kun ĝojo.

La kanto silentis la 5an de aprilo en la jaro 2001 kaj Sonya Hedenbratt estis entombigita

sur la Orienta tombejo en Gotenburgo. Sed se vi volas aŭdi Sonya Hedenbratt kanti, vi trovas multe da enfilmigitaj kantoj per YouTube. Kial ne aŭdu "Rågsved", "Vi har det bra", "Soffi Propp" sed ne forgesu "Låt hjärtat va me"...

*Ingegerd*

## Nova esperanta versio de "La koboldo" de Viktor Rydberg

fare de Tatu Lehtilä, Stokholmo, [tatulehtila@gmail.com](mailto:tatulehtila@gmail.com)

Li diras: Antaŭ kelkaj jaroj mi faris la jenan tradukon de la poeziaĵo "Tomten" de Viktor Rydberg, kun esperanta titolo "La koboldo". Ĝi temas pri koboldo, kiu meze de la vintro estas ĉe dometo kie loĝas homoj. Li ĉirkaŭiras la dometon dum li havas profundajn pensojn. En la teksto mi uzas la vortojn "koboldo" kaj "gnomo" sinonime, kiel tradukojn al la sveda vorto "tomte".



1. Mezvintre nokte frostas vent'  
steloj lumetas kaj brilas  
Dormas dometo en silent'  
meze de nokto trankvilas  
Luno movas sin trans ĉiel'  
Lumas abi' per la neĝa hel'  
Blank' sin sur ĉio formas  
Nur koboldo maldormas

2. Grizas starante antaŭ dom'  
Griza en blank-amaso  
Vidis plurfoje tiu gnom'  
lunon dum ĝia paso  
Ar' da abioj, pinoj nur  
nigre ĉirkaŭe kiel mur'  
Vane li tre cerbumas  
mense enigmo zumas

3. Barbon kaj harojn frotas li  
faras li kapan neon  
"Mi ne pri tio pensu pli,  
ne, mi ne havas ideon"  
Puŝas li – kiel ĉiam – for

tuj tiajn pensojn el memor'  
Li ne atendu peton  
faras nun laboreton

4. Ĉe la stokejo kaj la ilej'  
palpas li ĉiujn serurojn  
Bovoj en budoj sonĝas plej  
havas somer-aventurojn;  
Ne pri selo aŭ vip' aŭ pen'  
sonĝas ĉevalo, per eta hen'  
sed ke en kripo lia  
plenus dolĉ' trifolia

5. Ĉe la bariloj de l' ŝafa ar'  
vidas li dormon de l' idoj  
Ĉe la kokej' virkoka star'  
mezas por ĉies vidoj  
Karĉjo, la hundo, viglas nun  
vidas koboldon sub la lun'  
Flaras Karĉjo rekone  
ili amikas ja bone

6. Laste vizitas en silent'  
li ĉe la mastraj homoj

Kara pro sia diligent'  
estas kobold' en domoj  
Vidas etajn de l' famili'  
ĉarmajn infanojn kaŝe li  
Tion li ne oponas  
grandan feliĉon donas

7. Patroj kaj filoj tiel ĉi  
dormis ja ekde ĉiam  
Tamen de kie – pensis li –  
venis do ili iam?  
Sekvis maljun' kaj jun' en ĉen'  
Floris kaj pasis for – kien?  
Stranga enigmo restas  
ree en penso estas

8. Iras kobold' al subtegment'  
kie la hejmo estas  
Kuŝe en fojna plaĉa sent'  
tie hirundo nestas  
Nun estas nesto sen loĝant'  
sed printempe ja ekos kant'  
Tiam en temp' revena  
iĝos la nesto plena

9. Tiam rakontojn hirundin'  
pri la vojaĝo trilos  
sed enigmo de l' gnom' en fin'  
ĝi ja plu malfacilos  
Lumas la luno tra fendo sur  
barbon koboldan, tra ligna mur'  
Brilas la barbo densa  
de gnom' profunde pensa

10. En ĉirkaŭo, arbara ter',  
viglas en frosto nenio  
Sonas fore do nur river'  
flua en forta strio  
Sed imagas kobold', ke bru'  
tie estas la tempa flu'  
Kien do iras ĝi flue?  
Kie ĝi fontas, unue?

11. Mezvintre nokte frostas vent'  
steloj lumetas kaj brilas.  
Dormas dometo en silent'  
ĝis la mateno trankvilas  
Luno iras al sub ĉiel'  
Lumas abi' per la neĝa hel'  
Blank' sin sur ĉio formas  
Nur koboldo maldormas

## La legendo pri la kristnaska rozo de Selma Lagerlöf

### Rabistoj en la Göinge arbaro en Skanio

(libere rakontita de Siv Burell....pardonon Selma!)

La abato Hans en Övedskloster (la abatejo Öved) en Skanio kreis belan ĝardenon kun medikamentaj herboj kaj amazo da diversaj floroj. Estis meze de la somero kaj la monaĥoj estis okupitaj pri sarkado de la bedoj. Subite laiko, kiu ankaŭ laboris en la ĝardeno, rimarkis ke almozulino kun kvin infanoj vagis en la ĝardeno. Unu el la etuloj vidis malfermitan pordon kaj ĉiuj eniris. Rabista Patrino spektis la blankajn liliojn kaj la hederon, grimpantan sur la monaĥeja muro. La juna monaĥo provis forpeli ŝin, sed ŝi estis tro forta kaj nur pelis lin flanken. Ŝi spektis la florojn kaj ŝajnis kiel ŝi konis ilin. Du fortaj

monaĥoj provis preni ŝin, sed tiam ŝi kriis, batalis, ungovundis kaj mordis ilin kaj same faris la infanojn.

Tiam ili forlasis ŝin kaj iris al la abato Hans. Hans ne ŝatis ke ili uzis perforton kaj iris por paroli kun Rabista Patrino. Ŝi denove iris spektante la florojn, flaris kaj ŝajnis kontenta. Al kelkaj floroj ŝi ridetis, al aliaj ŝi skuis la kapon.

Hans ja tre ŝatis la ĝardenon. Rabista Patrino ankaŭ ŝatis ĝin. Pro tio ŝi ja ĵus luktis kontraŭ tri monaĥoj por resti en la ĝardeno. Hans alproksimiĝis de antaŭe kaj demandis: Ĉu vi

ŝatas la ĝardenon?  
Unue Rabista  
Patrino pensis pri  
atako, sed kiam ŝi  
vidis lian blankan  
hararon kaj kurban  
dorson, ŝi pace  
respondis: "Unue  
mi pensis ke mi  
neniam antaŭe  
vidis tian belan  
ĝardenon, sed nun  
mi vidas ke ĝi ne  
povas konkuri kun  
alia en la Göinge  
arbaro." La laiko,  
kiu nun staris  
flanke de la abato,  
protestis, mokante:  
"En la Göinge



arbaro nur kreskas piceoj kaj pinoj, sed ĉi tiu  
ĝardeno estas la plej bona en la tuta Skanio!"

Rabista Patrino ĉagreniĝis: "Mi pensis ke vi  
sanktuloj devas scii ke la Göinge arbaro ĉiun  
kristnaskan nokton transformiĝas en Edenon  
por celebri la naskiĝon de nia Sinjoro. Ni, kiu  
loĝas en la arbaro, vidas la transformon ĉiun  
jaron". La abato jesis "Mi fakte aŭdis pri tio  
de pluraj personoj".

Li petis al Rabista Patrino, ke li povu veni al la  
rabistejo la venontan Kristnaskon. Eble ŝi  
povus sendi iun el la infanoj al li por montri la  
vojon?

Rabista Patrino unue neis. Estus tro danĝere  
por Rabista Patro, kiu estas proskribita, se iu  
sciu kie li loĝas. Tamen ŝi estis fervora pruvi,  
ke ŝi pravus. "Nur unu akompananto kaj  
neniu embusko!", finfine ŝi diris.  
Interkonsentite!

Kiam la episkopo post iu tempo venis de Lund  
al Övedskloster, Hans petis pri leĝa protekta  
letero por Rabista Patro. La episkopo neis,  
dirante ke estus malagrabla havi tutan

rabistaron loĝanta  
sur la ebenaĵo. La  
infanoj ja baldaŭ  
estos plenkreskaj.  
Sed Hans ardis: "La  
rabistoj ne estas  
tiel malbonaj, ĉar la  
grandiozo de la Dio  
ja montriĝas por  
ili". La episkopo  
cerbumis... "Jes, se  
vi povas sendi al mi  
floron de la Edeno,  
mi skribos leĝajn  
protektajn leterojn  
al ĉiuj, kiujn vi volas  
protekti". La laiko  
aŭskultis. Li pensis  
ke nek la episkopo  
nek li mem kredis

je la Edeno en la Göinge arbaro. Sed abato  
Hans nenion rimarkis kaj kore dankis la  
episkopon.

La venontan Antaŭtagon de Kristnasko abato  
Hans kaj la laiko estis survoje. Unu el la  
sovaĝaj infanoj de Rabista Patrino kuris antaŭ  
ili. La monaĥoj sciis nenion, ĉar Hans imagis  
ke ili certe ne permesu al li rajdi en la sovaĝaj  
arbaroj. La laiko suspektis kaptilon kaj volis  
protekti Hans.

Rajdante ili vidis kiel oni preparis sin por  
Kristnasko. Estis fajro en la bakejoj. Oni  
prenis viandon kaj panon en la domon. Aro  
de malriĉuloj iris de la monaĥejo kun pano  
kaj longaj kandeloj, kiujn ili estis ricevintaj de  
la monaĥejo.

Kiam ili atingis la arbaron la vojo  
malpliboniĝis. La ĉevaloj devis iri en riveretoj,  
ĉar ofte mankis pontoj. Pli alte la tero estis  
plena je neĝo. Krutaj glataj vojetoj kaj veproj!

Kiam la taglumo komencis malaperi la rabista  
knabo kondukis ilin trans arbara herbejo kun  
altaj arboj ĉirkaŭe. Malantaŭ la herbejo estis

montetmuro kaj en ĝi pordo. Ili estis ĉe la celo. La infano malfermis la pezan pordon. Estis granda groto. Rabista Patrino sidis ĉe la fajro. Laŭlonge de la muroj estis litoj el picea branĉoj kun musko en la supro. Rabista Patro estis dormanta. Ili enprenis la ĉevalojn ĉar estis tro malvarme ekstere.

Malriĉe! La infanoj manĝis kaĉon. Rabista Patrino diris: "Manĝu kiun vi alportis, kaj poste vi povus dormi, ĉar daŭras kelkajn horojn ĝis estas tempo." Hans prenis sian provianton, sed estis tiel laca ke li ne povis manĝi multon. Li kuŝiĝis kaj dormiĝis. La laiko ankaŭ kuŝiĝis, sed ne kuraĝis dormi. Pensu, se la rabistoj katenis la abaton Hans. Finfine ankaŭ la laiko ekdormiĝis.

Vekiĝinte, li vidis Hans sidantan ĉe la fajro. Li parolis kun Rabista Patrino. Ankaŭ Rabisto Patro sidis tie, sed kun la dorso al ili, kvazaŭ la interparolo ne interesis lin. La abato Hans rakontis pri la kristnaskaj preparoj, kiujn li estis vidinta. "Bedaŭrinde ke viaj infanoj ne povas ludi en la julpajlo, ne maskovesti sin kaj ne povas kuri laŭlonge de la vilaĝa vojo." Tiam Rabista Patro koleriĝis kaj minace pugnigis la manon. "Ĉu vi ne scias ke mi estas proskribita kaj ne devas forlasi la arbaron?"

Abato Hans rigardis lin rekte en la okulojn dirante: Mi provas havigi al vi protektan leteron de la episkopo. Tiam la rabista paro ekridegis. Ili ja sciis kian punliberigon ili povus atendi de episkopo Absalon. "Sed, se mi havus tian leteron mi eĉ ne ŝtelu anseron", li diris.

Subite Rabista Patrino ekstaris. "Ni ne forgesu la arbaron. Mi aŭdas ke la julsonoriloj sonoras. Ĉiuj kuris eksteren. Kiel mallaŭta sonoro povus vekti la arbaron, Hans pensis. Subite lumeto iris tra la arbaro. Poste denove mallumiĝis, sed la lumo revenis kaj kvazaŭ batalis antaŭen kiel brila nebulo inter la arboj. Tiam Hans rimarkis ke la neĝo pli kaj pli

foriĝis, kvazaŭ iu forprenis tapiŝon. La filikoj eligis etajn ŝosojn. Printempaj floroj aperis.

Hans havis larmojn en la okuloj pensante: "Ĉu mi maljunulo vere spertas iun tian?"

La mallumo iomete revenis, sed baldaŭ nova lumondo venis. La riveretoj lirlis, la folioj malfermiĝis. Ne nur arboj kaj herboj vekigiĝis. Birdoj saltis ĉirkaŭe en la arboj. La pegoj tamburis sur la trunkoj de la pinoj. Sturnoj eksidiĝis sur pino.

Nun venis nova ondo kun semoj el pli sudaj areoj, kiujn la birdoj alportis. Atinginte la teron ili rapide kreskis. Mirteloj kaj vakcinioj floris. Grizaj anseroj kaj gruoj kriis en la aero. La fringoj konstruis nestojn kaj la sciuroj ludis sur la branĉoj.

Ĉio okazis rapide kaj Hans ĝuis. Li flaris odoron de novplugitaj kampoj. La paŝtoknabinoj logvokis la bovinojn. La sonoriloj de la ŝafoj sonoris. La junipero ricevis berojn, kiuj ŝanĝis koloron. Blankaj anemonoj, hepatikoj, flavaj anemonoj kovris la teron. Hans klinis sin kaj prenis arbaran fragfloron kaj kiam li stariĝis, la bero maturiĝis. La vulpino venis el la kaŝejo, tuŝis la jupon de Rabista Patrino kaj ŝi laŭdis la vulpidojn. La kukolo kriis.

La rabistaj infanoj ludis kun leporidoj. Unu prenis vipuron de la tero kaj volvis ĝin ĉirkaŭ sia kolo. Rabisto Patro staris sur la marĉejo manĝante marĉajn rubusojn. Nigra urso iris kun li ankaŭ manĝante marĉajn rubusojn. "Ĉi tiu tufo estas la mia!"

Pli da varmo venis kun grandaj multkoloraj papilioj. Abeloj jam havis mielon en nesto sur kverko. Floroj el fremdaj landoj ekfloris. Rozoj grimpis laŭlonge de la monteto.

Hans pensis pri la floro, kiun li devis pluki por la episkopo. Li volis preni la plej belan, sed ne povis decidi kiun elekti. Nun sentiĝis ke ĉiu haltis atendante ĉielan beatecon. La spirito

volis flugi al la ĉielo. Oni aŭdis muzikon, kanton... ĉu estis anĝeloj?

Birdoj flugis ĉirkaŭ Hans kaj li povis tuŝi ilin per siaj manoj – sed ĉirkaŭ la laiko ili ne estis. La bestoj timis lin. Nur eta kolombo provis klini sian kapon al lia vango, sed li direktis baton kontraŭ ĝi kriante: "Iru inferen, de kie vi venis!" La anĝeloj estis tiel proksime al Hans ke li preskaŭ povis tuŝi ilin, sed kiam ili aŭdis la krion de la laiko ili tuj malaperis. La laiko kredis ke ĉio devas esti ago de la diablo. Nun la varmo malaperis timante la malhelon en homa koro. La nokto revenis, la malvarmo revenis, la herboj kuntiriĝis, la bestoj malaperis kaj la folioj falis de la arboj.

Hans pensis ke li ne travivu ke la anĝeloj estis tiel proksime por kanti kristnaskajn kantojn, sed estis forpeltitaj.

Subite li memoris la floron al la episkopo, li klinis por trovi sur la tero, sed la tero frostiĝis, la blanka neĝo revenis. Lia koro ne plu havis forton kaj li restis kuŝanta sur la tero.

Ĉiuj iris palpante al la rabista kuŝejo, sed Hans ne. Oni prenis lignon el la fajro kaj trovis lin morta. La laiko estis senespera – pensante ke li kaŭzis la morton de Hans.

Venontan tagon oni portis lin al la monaĥejo. Tiam oni trovis ke li havis ion en sia pugnigita mano – blankajn radiktuberojn.

La laiko metis ilin en la ĝardenon. Poste li atendis la tutan jaron ke estus floro, sed vane. Kiam vintro venis li ĉesis kontroli.

En la Antaŭtago de Kristnasko li tiel intense pensis pri abato Hans, ke li eliris kaj trovis, ke en la neĝo staris verdaj tigoj kun arĝentblankaj floroj. Ĉar la aliaj plantoj estis mortaj, li komprenis ke la floroj estas venintajn de la Edeno en la Göinge arbaro. Li vokis la aliajn monaĥojn kiuj donis al la laiko la taskon rajdi al la episkopo Absalon kun la floro. La episkopo paliĝis sed diris: "Hans agis laŭ sia promeso, do ankaŭ mi faros tion".

Kun la protekta letero en la poŝo la laiko rajdis al la Göinge arbaro. Kiam li atingis la kaŝejon Rabista Patro venis kun levita hakilo en la manoj. Mi dishaku ĉiujn monaĥojn, li minace diris. Certe estas pro vi, ke la Edeno ne montris sin kiel antaŭajn jarojn.

"Estas mia kulpo", diris la laiko, "mi povas morti, sed unue mi havas saluton de la episkopo Absalon: Jen la letero, dirante ke vi estas leĝe protektita. Estonte viaj infanoj ludu en la julpajlo kaj celebru Kristnaskon tiel ke abato Hans deziris."

Rabista Patrino venis: "Hans plenumis sian promeson, do ankaŭ Rabista Patro faru same!"

La rabista familio translokiĝis al la vilaĝo. La laiko translokiĝis en la rabistan kaŝejon por "elpagi sian kulpon".

La Göinge arbaro ne plu floradas kristnaske. La sola, kiu restas, estas la Kristnaska floro.

*Siv*

## La Baltaj tagoj en Litovio, 6–14 de julio



Hodiaŭ, la 6an de januaro 2019, estas precize duonjaron antaŭ la komenco de la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos la 6–14 de julio 2019 en Panevėžys. Jam 272 aliĝintoj.

Vida Kulikauskiene kaj Panevėžio Esperanto Klubas Revo enmetis tion en Fejsbuko kie Siv trovis ĝin.


## Pola Kristnaska saluto de Elvira al ĉiuj, kiujn ŝi konas

La anĝeloj kaj steloj estas faritaj el minca fadeno.  
Kia bela manlaboro! /Siv




## Feliĉan Novan Jaron de Pollando!

de Lucyna kaj Marek, Gdansko



## Mirinda Etoso de Pollando



*Bildoj el Gdansk, ricevitaj de Elwira Twadowska.*

### Poemo pri talento, originale verkita en esperanto de Lilli Giloteaux

”Se mi havus talenton” (trovita en YouTube)

Se mi havus talenton  
min esprimi poezie  
ne hezitas mi momenton  
por ekverki vortebrie  
Per poemoj flue glataj  
kaj kantas harmonie  
mi, per vortoj delikataj  
vin salutas melodie

Per novelo absorbanta  
mi volonte vin regalus  
Kaj per stilo eleganta  
kun Valano mi rivalus  
Sed, ho, mankas rimosento  
kaj florriĉa fantazio  
mankas lingva kompetento  
Sed, ho, finfine mankas ĉio





Lilli Giloteaux havas plurajn talentojn. Bv. spektu ŝian albumon:  
Akvareloj de Lilli Giloteaux

<http://www.ipernity.com/doc/158659/album/613355/@/page:2:9>

GILOTEAUX, Lilli. 1924–2013. Francino de germana origino; kartografia inĝeniero. Naskiĝis en Berlino. Ano de esperantista familio. Verkis poemojn kaj fakajn verkojn pri arboj. Ilustris proprajn librojn kaj tri poemarojn de Leen Deij. Ordeno de verda plumo, 2006.

## Filoj de la epoko (Wisława Szymborska)

En Ipernity mi (Siv) trovis la sekvan:



Ni estas filoj de l' epoko  
l' epok' estas politika.

Ĉiuj ciaj, niaj, viaj  
tagaferoj, noktaferoj  
politikaj as aferoj.

Vol-nevole  
viaj genoj havas pasintecon politikan,  
via haŭt' koloron politikan,  
la okuloj lumon politikan.

Viaj vortoj havas resonancon,  
kaj prisilentoj, havas valoron  
tiel iel politikan.

Eĉ irante tra arbaro  
Via paŝ' as politika

Sur tereno politika.

Eĉ la vers' nepolitika estas politika  
kaj alte brilas la lun',  
ĉi umo ne plu luna.

Esti aŭ ne esti, jen problemo.  
Kiu problemo, respondu je dilemo.  
Politika problemo.

Vi eĉ ne endas esti homestaĵo,  
por akiri signifon politikan.  
Sufiĉas ke vi estu petrolo,  
paŝtaĵo nutriga, materialo reciklebla.  
Aŭ konferenca tablo, pri kies formo  
oni kverelis dum plurmonatoj:  
se negoci pri vivo kaj morto  
ĉe tablo ronda aŭ kvadrata.

Ĉu vi konsentas pri ŝia takso de politikistoj? /Siv

## Anekdoto (el 1904)

BONA EKZERCO. – La sinjoro: "Vi tre lerte eltiris la denton."

La dentisto: "Jes, tion mi certe kredas. Kiom da korkoj mi ne eltiris en tiu tempo, kiam mi estis kelnero! Tio estis bona ekzerco!"

## Esperanto-Sabato en Gotenburgo, 19 jan. 2019

En numero 13, la decembra numero de Ora Ĵurnalo, mi skribis pri LärOlika (Lernu diversmaniere!). Hodiaŭ Karin Bruce kaj Khaali Muhamed venis al ni. La celo de LärOlika estas komunikado – same kiel estas la celo de la Esperanto-movado. La mondo pliboniĝu, se homoj provas kompreni unu la alian.

Nur unu persono estis nova en la grupo, tamen funkciis la prepara "konatiĝa rondo". Kutime Karin kaj Khaali kunigas personojn, kiuj estas fremduloj. Ili venas de diversaj urbopartoj, diversaj landoj kaj havas diversajn okupojn kaj diversajn interesojn. Ni diris niajn nomojn kaj elektis unu vorton pri kiu ni ekpensis. Ni ja devis traduki la esperantajn vortojn al niaj gastoj.

Kiu elektis la vorton *birdo*? – Kompreneble Jan. Kiu elektis la vorton *muziko*? – Kompreneble Christin. Kiu elektis *libro* – Kompreneble Monica. Kiam Khaali elektis *Ne*

– kiu elektis *Jes*? Kompreneble Lasse. Magnus elektis *dormi*, sed li ŝajnis maldorma la tutan tempon. Eble Arild maltrafis la kafotablon en la najbara ĉambro, ĉar li elektis la vorton *kafejo*. Fransisco elektis *hakilo* kaj Inga klarigis ke tiu vorto kaj signifas armilon, kaj agrikulturan ilon.

La prezentado daŭrigis kun diversaj aliaj "ludoj kun seriozo en la fono".

En marto–aprilo okazos la venontaj kvin seminarioj en Gotenburgo. Vidu pli kaj aliĝu per [www.larolika.se](http://www.larolika.se) Kontakto: [info@larolika.se](mailto:info@larolika.se), 0730–60 75 88.

La posttagmezon ni laboris en du grupoj, ok en ĉiu. Unu grupo estas konversacia grupo, kiu renkontiĝas dum esperanto-sabatoj, la alia sekvas la libron *EPOGo* kaj havas kurson 12 fojojn dum la printempo. /Siv

Jen kelkaj bildoj de la evento en Redbergsskolan:





## Problemoj fariĝi poligloto – Erik Åberg sendis internet-ligilon

Chris, loĝanta en Louisiana, volis lerni specon de la franca, parolata en parto de Louisiana. Ĝi nomiĝas la kajuna franca, kaj estas influita de variaj indianaj lingvoj, sed ankaŭ de la angla, la hispana kaj la germana. Ĝi estis transdonita buŝe de generacio al generacio ekde la 18a jarcento.

Chris, kiu parolas la anglan, provis jam de sia infaneco kapti la kajunan francan, kiam li sidis el la atendĉambro de la dentisto aŭ doktoro. En la lernejo li komencis lerni la klasikan francan. Centojn da vortoj li lernis, sed paroli france estis granda problemo. Li studis la francan dum du jaroj en High School. Li imagis ke li volus iri al Parizo iutempe por edziĝi. La atestoj estis bonaj, sed Chris ne estis kontenta.

Li decidis forlasi la francan. Oni diris al li: Se vi ne uzas la francan, vi perdos ĝin.


Li provis lerni novan lingvon, la japanan. Interese lerni tiun ekzotikan lingvon! Li aĉetis amason da libroj. Li intervaloj revenas ĝis ĝi firme restas en la memoro.

Chris ankaŭ komencis lerni la skriban japanan. Troviĝas tri alfabetoj (kanji, hiragana kaj katakana. La unua havas ĉinajn literojn). Lerni kaj la buŝan kaj la skriban lingvo estas kiel lerni du diversajn lingvojn. Li rezignis kaj provis lerni la germanan, sed subite li decidis lerni la hispanan samtempe. Tro multe por lia cerbo. Tiam li komencis legi librojn pri metodoj lerni lingvojn, ekz. "How to learn any languages" (Kiel lerni kiun ajn lingvojn) de Barry Farber, la unua poligloto, pri kiu Chris

aŭdis. Poste li legis "Fluent in three months" (Kiel fariĝi flua en tri monatoj) de Benny Lewis.

Li revenis al la franca, la germana kaj la hispana, sed tro laboris (ekz. lernis 600 vortojn dum du semajnoj) kaj fariĝis interne bruldetruta. Poste provis krei propran lingvon, kiun li nomis Tethrioth, faris alfabeton, 60 vortojn kaj iomete de gramatiko.

Tiam li legis pri Esperanto. Li ŝatis la ideon pensante ke se japano kaj li samtempe lernu



Esperanton, oni gajnu tempon. "Mi ne lernu la malfacilan japanan kaj li ne la malfacilan anglan!" Post tri semajnoj li decidis "iri sur la vojeto de Esperanto".

Se iu volus scii kiel lia esperanto evoluas, bonvenu spekti lian retpaĝon! Li regule skribas pri sia studado.

Vi povas gugli al la paĝo de Chris: *My Language Past & Why I'm Learning Esperanto* /Siv


## Marvirinstrato – libro kun 18 noveloj, verkitaj en Esperanto

El Fejsbuko

"Marvirinstrato" estas libro de 18 noveloj originale verkitaj en Esperanto verkita de Tim Westover. Ĝi estas senpage elŝutebla kiel elektronika libro kaj aĉetebla per Amazon, <https://www.timwestover.com/marvirinstrato>

*Urba bestoĝardeno plenas je feniksoj kaj marvirinoj. Stranga ruĝvela ŝipo revenas kun kargo de perditaĵoj. Kantanta arbo trompas la esperojn de spektantoj.*

Vi rajtas libere uzi kaj represi la novelojn el tiu ĉi novelaro en via klubo, kurso, podkasto, radioelsendo, bulteno aŭ periodaĵo laŭ la kondiĉoj de la permesilo Creative Commons. Menciu la retadreson de tiu ĉi retejo



(<http://www.marvirinstrato.com>), kie oni povas legi la tutan novelaron.

## Granda paruo – Parus major

Granda paruo, multkolora birdo kiu troviĝas ĉirkaŭ niaj birdotabloj. Ĝi manĝas ĉiujn specojn de manĝaĵoj ekzemple semojn, berojn, panerojn, insektojn kaj fagofruktojn.

Ĝi volonte multe manĝas.

La birdo estas 14 centimetrojn longa kaj pezas 20 gramojn. La virbirdo havas pli



buntajn kolorojn ol la virina birdo. La sono aŭdiĝas "ti ti thie" kaj "si-jútti-si-jútti".

La granda paruo estas bela kaj amuza birdo!

## La granda paruo kaj la vento

Estis iam granda paruo kiu sidis sur branĉeto kaj pensis pri sia signifo en la mondo. Ĉar li manĝis preskaŭ ĉion, li ne bezonis malsati. Ĝuste dum tiu vintro, li trovis bonan



manĝejon, kiu havis ĉion, kion li povis deziri. La vivo ridetis al li, kie li sidas sur la branĉeto.

Sed la vento, kiu fajfadis super la arboj volis mistifiki la grandan paruon. Tiel la vento blovis al la eta flava birdo kaj flustris en lian orelon:

– Paruo, paruo! Vere malica paruo loĝas ĉi tie, vi devas venki lin se vi volas manĝi ĉi tie, do sekvu min! Mi montros kie li estas.

La vento ekbalais la birdon per sia blovo kaj levis la birdon kontraŭ la apuda domo ĉe la manĝejo. La domo havis fenestron kiu reflektis ĉiujn, kiuj estis ekstere.

Kiam la granda paruo vidis la pli grandan birdon vid-al-vide, li timemis kaj sentis sin malespera. Li streĉis la flugilojn kaj faris atakojn, fojo post fojo sed la malamika birdo kontraŭe, ne rezignis.

La batalo daŭris ĝis la vespero.

Tiam venis la saĝa arbarstrigo al la manĝejo.

"Klevitt klevitt" li diris, "ĉu vi ne vidas ke estas al vi mem, al kiu vi batalis la tutan tempon?"

– Vi mem estas la plej granda malamiko!

– Vi estas la paruo, kiun vi ne povas venki, klevitt, klevitt!

La arbarstrigo flugis al la valo kaj pensis pri la malica vento. La flava paruo sidis hirte kaj lace sur la tegmento antaŭ la fenestro kaj pensis pri kio la strigo diris kaj li murmuris:

– Mi mem estas mia plej granda malamiko, mi mem...

Longe, super la arbaro, oni povis aŭdi la venton, kiu ekridis pri sia ŝerco kun furioza bruego.

*Fabelo de Ingegerd Granat*



## Esperanto på två bibliotek, Inga Johansson ger oss dagsläget i Göteborg

1) Siv Burell och Inga Johansson gjorde den 10 januari 2019 besök på UB och Världslitteraturhuset/Gamlestaden.

2) Vi såg miniatyrbilden om Esperanto på UB, som Joakim Lilljegren ansvarar för. Vi passade på att fotografera av montern med de äldre exemplar av esperantoböcker som


finns på UB. Vi hoppas nu på en uppföljning av denna miniutställning, då man någon gång också kan visa vad som finns med esperanto idag och inför framtiden, exempelvis hur man kan använda internet.

Här två PDF filer med aktuell information på esperanto.

[https://en.unesco.org/sites/default/files/cou\\_4\\_18\\_eo.pdf](https://en.unesco.org/sites/default/files/cou_4_18_eo.pdf)

[http://www.esperanto-gbg.org/oraklubo/Ora\\_Jurnalo\\_n-ro\\_13.pdf](http://www.esperanto-gbg.org/oraklubo/Ora_Jurnalo_n-ro_13.pdf)

3) Vi åkte sedan ut till Gamlestaden och såg att på Världslitteraturhuset (bilden) finns möjligheter att i framtiden samarbeta om utställningar över esperanto.



På Plan 3 fanns avdelningen Mångspråkig med en riktig knubb på bokhyllan för esperantoböcker.

Så även på Plan 2 där det fanns barnböcker på många språk – även plats för esperanto.

Varje år utses årets barnbok av kongressen för esperanto. 2019 hålls denna kongress i Lahti, Finland, och det ska bli spännande att se vilken barnbok, som koras under denna kongress.

2018 blev boken från Brasilien, som kan ses denna länk årets barnbok:

<http://www.easp.org.br/kuriero/n-ro/220.html>

2016 en barnbok från Kroatien:

<https://retbutiko.net/nl/ero/trne>

2013 blev det Trollkarlen från OZ, 282 sidor på denna PDF-fil:

<http://i-espero.info/files/elibroj/eo%20-%20baum,%20l.frank%20-%20la%20mirinda%20sorĉisto%20de%20oz.pdf>

4) Vi fick 117 träffar på esperantoböcker hos UB.

När det gäller Världslitteraturhuset så samkördes med Gotlib för alla bibliotek i Göteborg/Stadsbiblioteket och samtliga filialer i Göteborg.

Gotlib ger idag 108 träffar för esperanto.

Tyvärr uppstod en konflikt mellan Nilssonska Fonden (som deponerat ca 800 böcker) och Stadsbiblioteket där många av dessa böcker försvann från katalogen/eller finns kvar men kan inte hittas.

Delar av dessa böcker finns i Stannum 15m<sup>2</sup> stort och innehåller också en arbetsplats för besökare eller forskare. Kontakta oss om du vill veta mer om vad som finns i vårt bibliotek. Läs också artikeln Böcker på esperanto i nytt bibliotek i Lerums Tidning eller på Stampgatan.

Ett exempel är Inga Borgs fem Plupp-böcker:

Plupo en la grandarbaroj / Inga Borg; el la sveda de Malte Markheden

Borg, Inga, 1925–2017.

BOK | 1987;

Ej Tillgänglig på Stadsbiblioteket Entréplan Barn Utländska Språk (SAKNAS)

Vad vi förstår kan vi återställa dessa böcker på hyllan Barnböcker om vi gör en ”inköpsförfrågan”.

Böckerna är fullt utrustade och kan med god vilja åter föras in i katalogen – så spar man pengar för nyinköp.

*Inga Johansson, styrelsemedlem i Nilssonska Fonden och Svenska Esperantoinstitutet.*

I Nilssonska Fondens bibliotek, ca 600 böcker; de flesta av dessa är nyare litteratur som förut var deponerade på Göteborgs Stadsbibliotek, men efter Stadsbibliotekets

renovering 2012–2014 flyttades böckerna hem till fondens ordförande Inga Johansson.

En mindre del av böckerna har flyttats till Stannumsbiblioteket.

*Inga*

## Esperantoutställning på Humanistiska biblioteket, Göteborg



NYHET: 2019–01–08

På Humanistiska biblioteket finns nu i entréhallen en mindre utställning om esperantorörelsens tidiga historia.

Utställningen är lagd av Joakim Lilljegen och visar bland annat ett exemplar av det första svenska esperantohäftet, tryckt i Warszawa för 130 år sedan. Med i utställningen finns också Emilie Flygare-Carléns novell *La*


*literaturisto kaj lia fianĉino*, det första svenska skönlitterära verket som gavs ut på esperanto (översatt av Otto W. Zeidlitz 1895).

*Inga Johansson hade tipsat om arrangemanget och vi båda åkte upp för att titta, fotografera och förhoppningsvis träffa Joakim Lilljegen, men han var tyvärr på lunch. /Siv*

## Volapük kaj Esperanto


**Alia planita lingvo antaŭ Esperanto estis Volapük.**

Dum la 19a jarcento plural diversaj konstruitaj lingvoj estis lanĉitaj por akceli internacian komunikadon, komercon kaj pacon. La plej disvastigita el ili estis *Volapük* de Johann Martin Schleyer de 1839, ĉi tie reprezentita de la antaŭfolio de la libro de Julius Lott *Die Kunst, die internationale Verkehrssprache Volapük*, kiun oni rapide lernas.



## Kompleta lernolibro de la Mondlingvo "Esperanto".

La unua lernolibro en esperanto, kiu estis eldonita en Svedio, estis presita en 1892. Ĝi estis kunmetita de Georg Henrik Backman (1867–1928), kiu je tiu tempo loĝis en Gotenburgo. Ĉi tie li ankaŭ fondis esperantoklubon, *La Esperantistoj*, kiu estis la dua en Svedio (post Upsalo) kaj la 12a en la mondo.



## Liseberg kaj la fratinoj Nonnen



Estas kanto ĉirkaŭ Liseberg...

Rapida torento de homoj enfluegas tra la grandioza portalo roza de la Gotenburga ekspozicio 1923. Ili ĉiuj havas la saman celon. Ili iradas direkte al la Granda Scenejo, kie ĉiuj seĝoj estas jam okupitaj. Sento de streĉita atendado pendas super la ejo, kaj baldaŭ kompakta amaso da homoj estas atinginta sian celon. Estas somero kaj lunda vespero en Gotenburgo. "Lotta en Liseberg". Kiam Lotta eliras sur la senkurtenan scenejon, la komune kantanta publiko tute ekstaziĝas, kaj neniu atentis, kiel punta kurteno flankenŝoviĝas en la unua etaĝo de la ĉefa manĝejo de Liseberg, la loĝdomo de la malnova glorhistoria bieno.

Ondas la maro de spektantoj dum Lotta ritme marŝas laŭ la meza trairejo kaj sidiĝas tie kaj

tie-ĉi, kantante kune kun diversaj pli aŭ iom malpli belsonaj individuoj el la publiko.

*"För ingen gav mig en sådan stund som jungfrun på Jungfrusund..."*

Nun oni povas ekvideti plian movon malantaŭ la punta kurteno. Osteca kaj vejna mano flankentiras la kurtenon. Pala, maldika vizaĝo aperetas malantaŭ la vitro. Baldaŭ ekvideblas plia vizaĝo. Ĉu eblas, ke du fratinoj spektas en la estontecon?

*"Känn ingen sorg för mig Göteborg..."*

Nun estas Håkan Hellström, kiu helpas la publikon kanti, dum varmeta vento balaas la maron de spektantoj. Al tiu, kiu estas perceptema, la vento parolas.



– Emily, kio do okazadas ekstere? Kiu estas tiu vulgara ino, kiu kuradas tien kaj reen en nia ĝardeno?

– Aĥ, kiam nia frato zorgis pri nia amata Liseberg, tiam regis ordo ĉi tie. Ĉu ne, kara fratino?

– Certe, tiam ne estis tia bruaĉo ĉi tie. Kion ŝi kantadas, la ino?

– Kaj jen la jupo mallonga, kiun ŝi portas! Rigardu! Nun alvenas ankoraŭ unu ulo tie antaŭe sub la tegmento.

– Li nur babilas!

– Ĉu vi ne vidas, ke tiuj, kiuj rigardas la aĉaĵon, ridas?

– Kio do tiom komikas, ĉu vi povas aŭdi, kion ili diras?

– Certe, kaj estis krude kaj stulte, kaj se infano niatempe dirus ion similan, ili ricevus batojn.

– Jes, pri tio mi estas tute certa. Sed de kie venas ĉiuj-ĉi homoj, kaj kial ili estas ĉi tie?

Antaŭe sur la granda scenejo prepariĝas granda vesperfinalo. Unu lasta komuna kanto estu kantata kun ĉiuj partprenintoj. Ili staras en longa vico antaŭe sur la scenejo, dum Lotta ion kriegas mikrofone pri la venonta lundo kaj pri la mirindaj artistoj, kiuj tiam gastos ĉe la Liseberga Komuna Kantado. Malkvieta moviĝo okazas en la spektantaro. Malrapide ĝi delokas sin direkte al la elirejo. Ondas la popola maro kvazaŭ ĝi estus tromatura kampo de sekalo en la vento. La granda publiko lante forlasas Liseberg-on.

Ĉe la fenestro oni povas diveni la figurojn de du mirantaj fratinoj. Du fratinoj fine kvietigitaj. Du fratinoj, kiuj vidis kaj spertis alian Liseberg-on. Tio, kion ili nun vidas el de sia fenestro, estas komercismo, pri kiu ili neniam povus revii. Deformado de ĉio, kion ili ŝatis kaj amis.

– Emily, kara, ankaŭ niatempe estis malpure. Mi memoras la aŭtunojn, kiam ni veturis en ĉaro, kaj la radoj plonĝis en la ŝlimon. Unufoje ni fakte ekfiksiĝis. Ĉu vi memoras, ke ni tiufoje devis marŝi hejmen?

– Jes, terure!

– Tio okazis ĝuste tie, kie nun staras la grandaj rozaj turoj. Neniam oni tuŝu tiujn monumentojn el 1923.

– Oni neniam scias! Kio okazas nuntempe en Gotenburgo? Kiaj fariĝis la homoj? Ĉu ili perdis ĉian senton por tio, kio estas bela?

– Certe estas tiel! Mi aŭdis, ke ili plenigas la urbon per altaj, grizaj, malbelaj kubo, kiam ili konstruas domojn. Griza evidente estas ilia plej ŝatata koloro.

– Kaj nian karan Lärjeholm ili laŭdire transformis en institucion por dekadencaj drinkuloj! Ĉu vi memoras niajn Kristnaskojn tie? Aĥ, kia feliĉo! Tiu sinjorlando, kiun vizitis eĉ Karolo XI.

– Ne forgesu, ke Ebba Brahe, la karulino de reĝo Gustavo Adolfo la Dua, tie naskiĝis; ŝi poste ja fariĝis reĝa korteganino.

– Rigardu, nun ili foriras!

La mallumo falas sur la amuzejon Liseberg. Lotta Engberg kantis sian lastan kanton tiun ĉi lundon. La multmilkapa aŭskultantaro iradas kontraŭ la elirejo, dum la vespero transiras en nokton. La memoroj de la komuna kantado kuŝiĝas sur la kronojn de la arboj. "Känn ingen sorg för mig Göteborg" ripozas en rozbedo, atendante novajn okazojn esti aŭdata.

– Kara fratino, la vespero alvenas!

– Nu jes, ni enlitiĝu.

Se vi hazarde vizitos la Komunan Kantadon en Liseberg, bonvolu ne forgesu ĵeti rigardon sur la fenestron en la unua etaĝo de la ĉefa manĝejo. Eble staras tie la fratinoj Nonnen

mirante kiel fariĝis Gotenburgo post kiam ili malaperis el la homa komunajo. Eble ili ne komprenas, kiel ilia bela gardeno fariĝis tiu ĉi konfuzajo de kurbfervojetoj, karusejoj kaj bonŝancaj radoj. Eble ili ne rekonas la melodiojn aŭdatajn de el la scenejo.

Kelkaĵojn ili eble ĝuas, dum aliaĵoj ilin eble konsternas.

Ankaŭ la muziko atingis novajn pintojn en Liseberg.

## Genealogia tabelo de John Nonnen kaj lia familio

Egbert Nonnen 1735–79 kaj Anna, fraŭlina nomo: Osborne



*La filo John Nonnen n. 25/1 en 1770 en Liverpool.  
Mortis la 8:an de majo en Gotenburgo.  
Lia edzino Anna Mathilda Lorent Nonnen.  
La paro geedziĝis la 1:an de junio en 1798.*

Anna Mathilda Lorent havis fraton, Abraham Robert Lorent, kiu estis bona amiko de John Nonnen. Abraham proponis al John fariĝi lia kunposedanto de la sukerfarejo "Klippan".

Infanoj:

Fanny Nonnen n. 1799

Edvard Nonnen n. 1804

Emily Nonnen n. 1812

Charlotte Nonnen n. 1813

Ann Nonnen n. 1815

Ĉu vi volas scii pli pri la familio Nonnen, legu la libron "La fratinoj en Liseberg", kiu estas tre interesa rakonto de Emily F Nonnen.



# Cipro, dividita insulo – Cypern, en delad ö



## Faktoj pri la republiko Cipro

Ĉefurbo: Nikosio.

Oficialaj lingvoj: la greka kaj la turka.

Memstareco de Britio: 1960.

Maldekstraflanka trafiko.

Post 11 jaroj de interna milito, la insulo estis dividita en 1974 en turka kaj greka partoj.

Valuto: Eŭro (kaj en la turka parto ankaŭ liro).

## Fakta om republiken Cypern

Huvudstad: Nicocia.

Officiella språk: grekiska och turkiska.

Självständighet från Storbritannien: 1960.

Vänstertrafik.

Efter 11 års inbördeskrig delades ön 1974 i en turkisk och en grekisk del.

Valuta: Euro (och i den turkiska delen också Lira).

## Vojaĝo al Cipro de Siv Burell kaj Ingrid Vallin

Språktidningen (la Lingvo-revuo) ofertis al siaj abonantoj relative malmultekostan vojaĝon, eble ĉar ĝi okazis la semajnon antaŭ kristnasko. Ingrid kaj mi iris. Ni ne atendis tian dramecan flugvojaĝon.

Oni ne povas flugi rekte al Ercan, en la turka parto de Cipro, ĉar tiu flughaveno nur estas

Språktidningen erbjöd sina prenumeranter en relativt billig resa, kanske därför att den låg veckan före jul.

Ingrid och jag åkte. Vi väntade oss inte en så dramatisk flygres.

Man kan inte flyga direkt till Ercan i den turkiska delen av Cypern, för den flygplatsen

aprobita kiel enlanda flughaveno. Unue ni devus surteriĝi en Antalya.

La piloto provis surteriĝi, sed la aviadilo skuiĝis kaj li estis devigita sori denove. Sen informo ni, la pasaĝeroj, maltrankviliĝis.

La piloto aviadilis longtempe antaŭ ol li faris novan provon – sed devis rezigni. Tra la malgrandaj fenestroj ni nur vidis nigron kaj de tempo al tempo helajn fulmojn, venante de la aviadilo.

Neniu parolis. Kelkaj klinis siajn kapojn suben aŭ tenis la manojn antaŭ la vizaĝo.

Mi ne scias kiom da provoj la piloto faris, eble tri, sed la tempo longiĝis. La plej malbona estis la manko de informo. Ĉu teroristoj? Ĉu la piloto svenis? Kien ni iras?

Finfine ni aŭdis la voĉon de la piloto. Ni estis survoje al Ankara, ĉar ne eblas surteriĝi en Antalya pro ŝtormego kaj pluvego. Ĉu la aviadbenzino sufiĉos, mi pensis. Post sufiĉe mallonga tempo ni surteriĝis en Ankara.

Laŭ la plano ni estus en la hotelo je la 19 h, sed ni devis atendi novan fluganaron, kiu venus per alia aviadilo.

Ni sidis en granda halo. Neniu aktiveco estis en la flughaveno. La vendejoj estis fermitaj. Ni sentis nin izolitaj kaj petis informon de kelkaj dungitoj, sed ili ne sciis multe.

Kelkaj provis dormi sur la malmolaj benkoj.

Aliaj uzis siajn mobiltelefonojn por sciigi siajn parencojn pri la situacio. La tempa diferenco inter Svedio kaj Ankara estas du horoj, inter Cipro kaj Svedio nur unu.

Subite ĉiuj rigardis al la mezo de la halo. Venis personaro kun sandviĉoj kaj akvo. Ni vere malsatis.

Finfine la nova fluganaro venis kaj ni povis flugi rekte al Ercan. Ĉirkaŭ duono post la kvara ni atingis nian hotelon en Famagusta.

var bara godkänd för inrikesflyg. Först måste vi gå ner i Antalya.

Piloten försökte landa, men planet skakade och han var tvungen att stiga igen. Utan information blev vi passagerare oroliga.

Piloten flög länge innan han gjorde ett nytt försök, men måste ge upp. Genom de små fönstren såg vi bara mörker och då och då ljusblixtar som kom från flygplanet.

Ingen talade. Några böjde sina huvuden neråt eller höll händerna framför ansiktet.

Jag vet inte hur många försök piloten gjorde, kanske tre, men tiden blev lång. Det värsta var bristen på information. Var det terrorister? Hade piloten svimmat? Vart var vi på väg?

Slutligen hörde vi pilotens röst. Vi var på väg mot Ankara, därför att det var omöjligt att landa i Antalya p.g.a. storm och hållregn. Räcker flygbränslet, tänkte jag. Efter en ganska kort stund landade vi i Ankara.

Enligt planen skulle vi vara på hotellet kl. 19, men man måste vänta på att en ny besättning skulle komma med ett annat plan.

Vi satt i en stor hall. Det var ingen aktivitet på flygplatsen. Affärerna var stängda. Vi kände oss instängda och bad några anställda om information, men de visste inte mycket. Några försökte sova på de hårda bänkarna. Andra använde sina mobiltelefoner för att underrätta sina anhöriga om läget. Tidsskillnaden mellan Sverige och Ankara är två timmar, mellan Cypern och Sverige bara en.

Plötsligt tittade alla mot mitten av hallen. Det kom personal med smörgåsar och vatten. Vi var verkligen hungriga.

Till slut kom den nya besättningen och vi kunde flyga direkt till Ercan. Ungefär halv fem kom vi fram till vårt hotell i Famagusta.



*Ingrid en la flughaveno en Ankara. Ŝi diris: "Mi havas konatulon ĉi tie, al kiu mi telefonis. Ŝi pretas venigi min al ŝia hejmo". Sed kompreneble ne eblis.*



*Panoramo de nia hotelo en Farmagusto.*



*La flagoj de Turkio kaj Cipro estas similaj, sed la koloroj ŝanĝas lokon.*

*En la greka parto loĝas 300 000 personoj en la turka parto 80 000. En Cipro oni havas 300 sunajn tagojn jare. Do, akvo estas problemo. En la turka parto akvotuboj el Turkio solvas la problemojn. En la suda, greka parto oni havas salejojn.*

*Nur unu tagon ni estis en la greka parto. Eŭro estas bona valuto kaj en la nordo kaj en la sudo.*

*Post la interna milito en 1974 Nikocio estas ĉefurbo dividita. Oni devas montri pasporton preterpasante la verdan linion, gardate de 1000 soldatoj, apogitaj de U.N. Formale la norda Cipro ne estas parto de Turkio, sed memstara republiko. Tamen Turkio estas la sola lando al kiu Turkcipro povas sendi varojn. Oni povas importi varojn de diversaj landoj, sed ne eksporti – krom al Turkio.*

*Pro la situo inter multaj landoj Cipro en iamaj tempoj estis granda komerca centro. La memoroj de tiu bonhava tempo abundas.*

Post kelkhora dormo en nia hotelo Salamis ni renkontis nian gvidanton Memiŝ. Iomete fulmotondris, kiam ni sidis en la aŭtobuso. Survoje al Nikocio, Memiŝ rakontis pri la interna milito kiu finiĝis per dividita lando kaj translokiĝo de turkoj al la norda kaj grekoj al la suda partoj.

Efter några timmars sömn på hotellet Salamis träffade vi vår guide Memiŝ. Det åskade lite när vi satt i bussen. På väg till Nicocia, berättade Memiŝ om inbördeskriget, som slutade med ett delat land och förflyttning av turkar till norr och greker till södra delen.

La Selimiye-moskeo, de la 14a jarcento, estas la plej granda konstruaĵo en Nikocio. La preĝo-elkrio estis aŭdebla vaste ĉirkaŭe.

Proksime situas la otomana serajlo – iama komerca loko kaj tranoktejo por komercistoj kaj iliaj kameloj.

Nun estas restoracio en la serajlo.

Ni havis liberan tempon por trapasi la verdan linion, sed ni preferis sidi en parko, spektante la kolombojn.




Selimiye-moskén, från 1300-talet, är den största byggnaden i Nicocia. Böneutropet hördes vida omkring.

I närheten ligger den ottomanska seraljen – dåtida affärscentrum och övernattning för handelsmän och deras kameler.

Nu är det en restaurang.

Vi hade ledig tid för att passera den gröna linjen, men vi föredrog att sitta i en park och titta på duvorna.



Survoje nordokcidenten al Karpaz, la plej maldence loĝata parto de la insulo, ni preterpasis du fiŝistajn vilaĝojn. La celo estis la muzeo de la apostolo Andreo, kiu estas regardata la plej grava loko de pilgrimado.

La apostolo Andreo trovis freŝan akvon por ŝipanoj kaj ankoraŭ la fonto ekzistas kaj la akvo sanigas haŭtmalsanojn.

På väg åt nordost till Karpaz, den minst befolkade delen av ön, passerade vi två fiskelägen. Målet var aposteln Andreas museum, som anses som den viktigaste vallfartsorten.

Aposteln Andreas fann färskvatten till en skeppsbesättning och fortfarande finns källan och vattnet botar hudsjukdomar.

En grandega ĉirkaŭbarila areo duonsovaĝaj azenoj paŝtis sin. Kelkaj iris al la muzeloko por esti manĝigataj de turistoj, kiuj aĉetis karotojn por ili.

Hejmenirante ni restis ĉe Golden Beach, mirinda longa strando. Tamen ne estis banezono.



Inom ett stort inhägnat område betade halvilda åsnor. En del gick till museiområdet för att bli matade av turister, som köpte morötter till dem.

På hemvägen stannade vi vid Golden Beach, en fascinerande lång strand. Men det var inte badesöng.



*Kiam la karotoj estas finitaj oni montru la malplenajn manojn, kaj la azeno iras al alia turisto.*



Meniŝ rakontis, ke estas malmultekoste aĉeti domon en la nordo de Cipro. Oni ĉie konstruadas novajn domojn.

Somere venas homoj el multaj landoj. Kiam la turkoj iras al la montaro por elteni la varmecon – pli ol 35 gradojn – la somergastoj



Meniŝ berättade, att det är billigt att köpa ett hus i norra delen av Cypern. Överallt byggs nya hus.

På sommaren kommer folk från många länder. När turkarna åker till bergen för att uthärda hettan – mer än 35 grader – så bor

loĝas en la vilaĝoj. Je somermezo oni devas esti ene dum la tago, sed nokte oni vidas tutajn familiojn, kiuj sidas ekstere.

La krimeco de Cipro estas preskaŭ nulo. Oni ja ne povas facile eskapi per ŝtelita aŭto. Cipro estas ja insulo.

Estas 14 universitatoj sur la insulo kun multaj eksterlandaj studentoj. La edukado estas senpaga. La loĝantaro estas bone edukita, sed kie estas la dungoj post la studoj?

Bedaŭrinde oni perdas multajn junulojn, kiuj iras eksterlanden por trovi laboron. Tamen la registaro kreas laborojn – "unu okupo por tri dungitoj" 😊 !

La trian tagon ni en Famagusto vizitis i. a.:

1. La Saint Nikolaus-katedralo, nun nomata la Lala Musatafa Paŝa-moskeo. 2. Kafejo en Famagusto.



Ĉipro estis krisolo de multaj kulturoj. Ni vizitis eĝan tapiŝvendejon, kie ni vidis kiel fari tapiŝojn kun miloj da nodoj. La rezulton oni havas post almenaŭ du jaroj. Kiel scii ĉu tapiŝo estas vera aŭ falsa? Se temas pri silka tapiŝo oni povas provi ĉu ĝi bruliĝas. (Ne provu!) Tiukaze ĝi estas falsa.

sommargästerna i byarna. Vid midsommar måste man vara inomhus under dagen, men på natten ser man hela familjer sitta utomhus.

Kriminaliteten på Cypern är nästan noll. Man kan ju inte lätt ge sig iväg med en stulen bil. Cypern är ju en ö.

Det finns 14 universitet på ön, med många utländska studenter. Utbildningen är gratis. Befolkningen är välutbildad, men var finns jobben efter studierna?

Tyvärr mister man många ungdomar, som åker utomlands för att hitta jobb. Ändå skapar regeringen jobb – "en plats för tre anställda" 😊 !

Tredje dagen besökte vi i Famagusta bl. a.:

1. Sankt Nicolauskatedralen, nu kallad Lala Mustafa Pascha-moskén. 2. Ett café i Famagusta.



Cypern är en smältdegel för många kulturer. Vi besökte en jättestor mattaffär, där vi såg hur man gör mattor med tusentals knutar. Resultatet har man efter åtminstone två år. Hur ska man veta om en matta är äkta eller inte? Om det handlar om en silkesmatta kan man pröva om den brinner (pröva inte!) I så fall är den falsk.




Ankaŭ al juvelmagazeno ni venis kaj al ledmagazeno. Ĉiuj situis en la "libera zono" sen impostoj.

Pri tiuj du grandmagazenoj nenio estis skribita en la broŝuroj, kiujn ni ricevis.

Pri kulturo ni povis legi multon. Jen kelkaj bildoj pri antikva saniga centro.

Fine bildo de la miniatura parko, kie ĉiuj gravaj konstruaĵoj de la insulo estas videblaj.



La monaĥejo Bellapais, en gotika stilo situas en montaro. Kruckavaliroj apogis la konstruon. Dum la 13a jarcento multaj kristanoj pilgrimis ĉi tien. La panoramo sur la havenurbo Kyrene estas mirinda.

Sur la fina bildo ni estas en strato de Kyrene. La ŝildo malantaŭ la statuo diras: "Girne", kiu estas alia nomo por Kyrene.

Också till en juveleraraffär kom vi och till en läderaffär. Alla låg de i "frizonen" utan skatt.

Om dessa båda stora varuhus stod ingenting i de broschyrer vi fick.

Om kultur kunde vi läsa mycket. Här är bilder på ett antikt hälsocenter.

Till sist en bild från miniatyrparken, där man kunde se alla viktiga byggnader från ön.



Klostret Bellapais i gotisk stil, ligger i ett bergsområde. Korsriddare stödde byggnationen. Under 1200-talet vallfärdade många kristna hit. Utsikten över hamnstaden Kyrene är magnifik.

På den sista bilden är vi på en gata i Kyrene. Skylten bakom statyn säger: "Girne", som är ett annat namn för Kyrene.



La ekskurso al Soli kaj Hilarion ne estis en la "pakaĵo", sed mi ne pentas ke mi elektis ĝin. "Jen via matena ekzerco: Kalkuli la ŝtupojn ĝis la fortikaĵeto. Estas ĉirkaŭ 400", Memiş diris. "Estas tri niveloj, sed la lastaj metroj ne havas ŝtuparojn. Vi devas grimpi." Neniu grimpis.

Pri la fortikaĵeto estis multaj faktoj kaj fantazioj.

Malamikoj povis bari la vojon por malsatigadi la enloĝantojn. Dum periodo 1000 sklavoj en vico portis akvon kaj nutraĵon supren.

Sed la plej fantazia rakonto temas pri reĝino (regatta?) kiu konstruigis sekretan trezorĉambrojn. Sklavojn, kiuj sciis pri la trezoro, ŝi mortigis.

Utflykten till Soli och Hilarion ingick inte i "paketet", men jag ångrar inte att jag valde den. "Här är er morgongymnastik: Räkna trappstegen upp till fortet. Det är ca 400," sa Memiş. "Det är tre nivåer, men de sista metrarna har inga trappsteg. Ni måste klättra!" Ingen klättrade.

Om fortet kunde berättas fakta och fantasier.

Fiender kunde barrikadera vägen för att svälta ut invånarna. Under en period fanns 1000 slavar som på rad forslade upp vatten och mat.

Men den mest fantasifulla berättelsen handlar om en drottning (ragata?), som lät uppföra en skattkammare. Slavar som kände till skatten,



Multaj jaroj poste, junuloj venis al la fortiketo kaj trovis la pordon de la trezorĉambro malfermita.

Ili volis kunpreni oron kaj juvelojn, sed subite la pordo fermiĝis – kaj restis fermita dum 40 jaroj. Dum tiu tempo la junuloj ne aĝis. Kiam la pordo malfermiĝis ili eliris kaj kuris suben sen iu oro. Moralaĵo: tempo pli valoras ol oro.



dödade hon.

Många år senare kom ungdomar till fortet och fann dörren till skattkammaren öppen. De ville ta med sig guld och juveler, men plötsligt stängdes dörren – och förblev stängd i 40 år. Under den tiden åldrades inte ungdomarna. Då dörren öppnades gick de ut och sprang neråt utan något guld. Sens moral: Tid är mer dyrbar än guld.





Lagoj ne troviĝas – krom tiu artefarita lago, kiu funkcias kiel akvorezervujo. Per akvotuboj de la montoj de Taurus en Turkio, oni plenigas la lagon per freŝa akvo.

La baziliko de St Auxibus havas svedan konekson. Nia reĝo partoprenis en la elfosado kiel volontulo.

Det finns inga sjöar – förutom den här konstgjorda sjön, som fungerar som en vattenreservoar. Genom vattenledningar från Taurusbergen i Turkiet, fyller man sjön med sötvatten.

St Auxibus basilika har svensk anknytning. Vår kung deltog i utgrävningen som volontär.



Troviĝas speciala sanktulo por tiuj, kiuj ne volas pagi impostojn – Sankta Mamas. Li estis mortigita en Turkio, kaj estis metita en sarkofagon el ŝtono sur ŝipon. La ŝipo subakviĝis, sed la sarkofago flosis kaj kie ĝi atingis teron en Cipro, oni konstruis preĝejon por li (la du plej subaj bildoj).

Det finns ett speciellt helgon, för dem som inte vill betala skatt – Sankt Mamas. Han dödades i Turkiet och lades i en sarkofag av sten på ett skepp. Skeppet förliste, men sarkofagen flöt och där den nådde land, byggde man en kyrka för honom (de båda nedersta bilderna).

*Fino de mia rakonto. Mi pensas ke la norda parto estas pli interesa ol la suda. Ni ja estis en Larnaca, sed tiu areo pli similas al la aliaj mediteraneaj insuloj.*

*Mi rekomendas tiun vojaĝon, aparte se vi havos Memiş kiel gvidanton. 2019 estos lia lasta jaro kiel gvidanto – Do rapidu! Li ne parolas la svedan, nur la anglan, sed tre klare.*

*Ĉu ni renkontis esperantistojn? Ne en Cipro, sed antaŭ multaj jaroj mi hazarde renkontis turkan esperantoparolantan gvidanton en Pamukkale. Sed li ne konis aliajn esperantistojn, bedaŭrinde. /Siv*